

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 367</i> <i>majo / 2022</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



SERÇO

En la post-vero-epoko,
homo kondamnitasi pensi,
kaj li ne povas forkuri de si mem.

Kiel metonimio de mi,
mi vojiras sub suno sur ĉielo
absurde blua ĉi-aŭtune,
la doloro pendanta en la ŝultro
per najloj fiksita,
en brako ankoraŭ mia.

Mi nur min renkontas
en la verda silento,
ĉe la paco de l' arboj maljunaj
sur la placo, kiu brakumas
min sen demandoj.

Juiz de Fora, 25/03/2022.

Transformiĝo

La maro estas
moviĝanta poemo,
kiun la dia Poeto reverkas
ĉiumomente, ĉiutage.

La ondoj galopas
en versoj ritmaj,
kiuj eksplodas
en furiozo dolĉa,
kaj ĉizas ŝaŭmajn kisojn
sur la sablo de l' strando,

kaj en la soleco de l' roko.

Antaŭ la maro, l' animo
paŭzon el silento kaj dankemo
al si permesas.

Rio- de -Janeiro, 19 de abril de 2022.

Tiberio Madonna (Italio)



La krueleco de l' naturo

La petaloj de la rozoj
falos diseriĝantaj
sur la herbon sekigitan
de l' suno.

En angulo de la herbejo
la formikoj en vico
forportas papilion
pecon post peco.

Ĉe la bazo de l' platano
nuda de aŭtuno

la delikataj membroj
de l' eta pasero
rabataj de muŝoj
kaj hororaj vermoj.

La verdo brilanta
de folioj freŝaj kaj glataj
ŝrumpas rigidiĝanta
en raspan brunon
kiu pikas la brunon
de l' tero frosta.

La uraganoj senkompataj
furiozantaj sur la mondo
similas al tiuj
kiuj agitiĝas
en l' animoj afliktitaj

de la koroj sangantaj.
 Kaj la sango
 fluas torente
 inter ŝtonoj kaj fragmentoj
 de la amoj rompitaĵ.
 Varmo kaj sekeco
 kuniĝas por soifigi
 tiujn samajn vivojn
 kiujn frido kaj pluvo
 kuniĝos por frostigi.
 La kotaj padoj
 enbrakigas la piedojn nudajn
 de l' viktimoj
 de cunamoj kaj tertremoj
 dum la fulmoj
 lumaj kaj blindaj
 bruligas l' arbojn
 kaj la gajecon.
 La kuroj anheligaj
 kaj terurplenaj
 de la mildaj gazeloj
 ĉasataj de la leonoj
 finiĝos
 eble neniam.
 Kaj la kuro senpaŭza
 de l' universo
 finiĝos ĝin glutita
 de l' terura nigra truo.

Starante
 ĉe l' fenestro de la vivo
 mi observas senespere
 la kruelecon de l' naturo
 presitan
 per lafo de vulkano
 sur la flugiloj de l' revoj.

Moissej Bronshteyn (Rusio)



Brulegas mava incendio de l' milit',
 ĝi brulas dume for de mi, sed tamen tio

pensigas, ke ja plej verŝajne estas mit'
 al nia mond' ne finportita harmonio.
 Kreita iam far la Majstro lingva ben'
 ĝis nun nestiĝis en nemultaj homaj koroj.
 La homamaso lertas bone vivi sen
 mizerikordo kaj kompatato al doloroj.
 Sed mi, kretene arkaika olda vir',
 preterlasante ĉies mokon kaj insulton,
 pri l'harmonio sankta pledas kun sopir'
 al paca Tero. Kaj plu fosas mian sulkon.

**

En niaj ĉarmaj junaj jaroj praepokaj
 nin por gloragoj laŭde benis nia dio.
 Agante vante, arogante sen stupor' kaj
 sen timo leza ni paŝadis al podio,
 sed finĝuinte la aplaŭdan eferveskon,
 kun ĉagreneto, eble tute senkiala
 ni elĉerpitaj senkuraĝis post la fest' en
 silent' lezanta nin en la vakuo hala.

Tampere, 1995

Ángel Arquillos (Hispanio)



MIA KATENO

Ĉio silentas,
 triste noktiĝas.
 Mia kateno, tro multe pezas,
 kaj mi tristiĝas.
 En mia ĉelo, malgranda truo
 estas la pordo de enstrudiĝanto:
 malgranda muso,
 kiu, ĉiutage,
 manĝas maltrankvile,
 ĉiujn restaĵojn.
 Mi ne komprenas,
 kial ĝi foriras,
 kiam mi volas tuŝi karese
 ĝian dorseton.
 Mi koleriĝas, ĉar ĝi kuretas
 kaj malaperas,
 kaj mia menso,
 denove nervas,

kaj mi sekigas,
per naztuketo,
varman larmeton
kaj post momento
mi endormiĝas.
Ĉi rakonteto,
ĉiam okazas,
kiam noktiĝas,
kaj vento haltas
kaj mi rigardas
kun granda sento,
mian katenon.

Rita Mkrtchyan (Armenio)



Aperas versoj. . .

Aperas versoj ne por la honoro,
Ne por aplaŭdoj, senbrue, en silent',
Nur eble pli batadas koro,
Ekfloras en animo ama sent'.
Naskiĝas strofoj dum sendorma nokto,
Aŭ en gaja kaj sunbrila tag',
Pro longe atendata varma vorto,
De iu nekonata amrigard'.
Aperas versoj de belega revo,
Sed povas esti, pro animdolor',
De ĝojaj aŭ tristaj pensoj,
En iu nekonvena hor'.
Poemoj povas dormi en kajero,
Kaj povas suprenflugi kiel bird',
Disdoni la pecetojn de espero,
Atingi homojn kun feliĉa kri'!



Yohanes Manhitu (Indonezio)



Anĝelino pasinteca

Kiam la steloj forlasas la vastan ĉielon
ĉar jam alvenas kaj salutas nova tago,
vi fariĝas neforgesebla anĝelino estinta.
Via nomo vivas kvankam ne parolata.

Vidu, niaj belaj tagoj kaj noktoj pasintaj
memorigas al ni pri promeso kaj ĵuro:
niaj malplenaj vortoj similas vanan rizon,
kiu estinte fruktodonis kaj beligis la vivon.

Anĝelino pasinteca, la vivo similas
dramon.

Unufoje ni ambaŭ renkontiĝis por prezenti.
Kaj kiam niaj scenoj finiĝas, ni restas
kiel la steloj forlasantaj la ĉielon.

Noemuti, Okcidenta Timoro, februare 2011

Signifo de via rideto

Ho, viaj okuloj min rigardis
kiam mi ekskribis mallongan vorton
en lingvo, kiun vi neniam konis.
Vi min demandis pri kio mi skribis.
Kaj vi donis al mi tiun rigardon;
granda scivolemo ĝi signifis.
“Pri amo senlima”, mi diris.
Vi ridetis sed flustris nenion.
Interpreti tiun rideton mi ne povis.
Provi mian amon mi ege volis
sed ni ne havis plenan sezonon.
La luno kune kun vi malaperis.

Yogyakarta, 29/III/2009

La fermata pordo de via koro

Ĉiufoje mi volas eniri tien –
en la profundon de via koro
por serĉi kion vi kaŝas tie,
por trovi veran respondon.

Sed ĉiufoje mi penas eniri,
 mia peno estas ĉiam vana
 ĉar la pordo de via koro
 ŝajnas eterne fermata.
 Mi demandadis al la suno
 kaj aŭskultadis al la luno
 ĉar mi volegas el ili scii
 kie vi kaŝis la ŝlosilon.
 La tempo daŭras forpasi,
 tagon post tago, estas mi
 serĉanta ĉian ebleceton
 por malfermi tian pardonon.
 Daŭri demandi al la suno,
 ne ĉesi aŭskulti la lunon
 eble ne estas veraj vojoj
 por trovi tiun ĉi ŝlosilon.
 Venas espero kaj forteco
 por vin tute ekproksimiĝi.
 Eble la ŝlosilo troviĝas tie:
 en via korpo aŭ via spirito.

Yogyakarta, 08/VI/2009

Jadranka Miric (Serbio)



Ĉerizfloreta brilo

Aprila venteto ekblovis,
 milde nigrajn harojn karesis.
 Sur via frunto la nigra hufeto falis
 kontrase al viaj bluaj okuloj!

Printempa flora odoro
 miksiĝis kun odoro de ĉerizfloro,
 vastiĝanta el ŝia malplektita hararo
 sur la ŝultron disŝutita !

Aprila magio
 Printempa seka frosteco.
 Aperis suno. Ekpepis birdetoj
 sur nudaj branĉetoj.
 Ĥorusa kantado kontraŭ taga freŝeco.

La kolombetoj are kolektiĝis.

Kverante siajn parulon ili alvokas.
 por festi la printempan alvenon,
 aŭ por flugigi siajn idojn. Ili forte
 ekzercas!

La vesperkrepusko kovris kolombejon.
 Ankoraŭ aŭdiĝis laŭta kverado!
 Subite kelkaj ekflugis alten .
 Ekbruis ama kverado aŭ intera
 kverelado?

La lasta taga sunradio reflektiĝis
 de fenestro fulme, brile.
 Por momento la vitro oriĝis.
 Kia bela aprila krepusko.
 Alogas min magie
 por momento.

Kiam aprilo printempas

La strata tiliar'
 ricevis novan robon.
 Ne estis pli nuda branĉar'.
 Tie oni vidas la birdoparon.

Aprila varmeta veter'
 al ĉiuj tre plaĉas .
 Tenera ventokiso ludas
 kun nigra harar' flirtanta en aer'.

Baldŭ suno subiros ore.
 Iuj ĉielaj nuboj ruĝiĝas.
 Laŭnidiroj la veter' pliboniĝos
 kvankam ekrosos aŭrore!

Al mia forpasinta amiko

Tuthazarde mi ekkonis vin.
 Via nomo Bela allogis min.
 Mi kredas en Savanto
 vi iĝis eksterterula kredanto!

Ĉu la vivo eblas estertere?
 Tiu temo interesigs min. Vere !
 Vi amis kosmulojn

mi teranajn povrulojn.

Neniam mi vidis vin
nek per *skypo* komputila,
tamen nia kunlaboro estis utila.
Niaj verkoj interŝanĝis.
Miaj rakontoj eterniĝis.

Via granda lerto
kaj mia verkemo
aperiĝis en via Vesperto.
Dank' al nia komuna deziro
ni gardis amikecon je ĉiu miro.

Elena Popova (Bulgario)



VOJAGE KUN I.K. AIVAZOVSKY

Ŝipo en plago
sub la okul' de ŝtormo.
Senvoĉa Luno.

Batalo nokte –
ĉielruĝo pro fajroj.
Sango kaj fumo.

Plenluno – sur la
luna vojo logita
velŝipo naĝas.

Fiŝkaptistoj dum
laboro je la maro.
Suno en nuboj.

Velŝip' en batal'
inter du malamikoj.
Postmorta gloro.

El Ararato –
homoj al estonto kun
kredo je Noa.

Neĝkovrita lok' –

karavano ĉe puto.
Akvo printempe.

Flirtantaj veloj –
parado de velŝipoj.
Milita pretec'.

Inter lavangoj –
karavano kun hundoj.
Griza senfino.

Di' sur la ondoj –
timigitaj fiŝistoj.
Malkredo kaj nun?!

**I.K. AIVAZOVSKY (1817- 1900)*

ARBARE KUN HENRI ROUSSEAU

Tutsola luno.
Juneco man' en mano.
Frost'. Nudaj arboj.

In' en arbaro.
Silent'. Verda trankvilo.
Modbruna robo.

Edena feliĉ' –
famili'. Amo. Filo.
Ludo per fluto.

Dormanta knabin'.
Leono. Mira luno.
Song' en dezerto.

Nokt' en edeno.
Ino muzikas. Floroj
kaj bird' aŭskultas.

Leona salto.
Antilop'. Vana kureg'.
Panter' atendas...

Nuda knabino
en ĝangal'. Okulfiksoj.

Sun' enrigardas.

Edeno. Tendo.

Adam' kaj Eva. Amo.

Muzika invit'.

Rajdanta Ares'.

Milit'. Murditaj homoj.

Korvoj sur ili.

Ĝangal'. Sunsinko.

Floroj. Homa figuro.

Besto atendas.

* HENRI ROUSSEAU (1844 – 1910)

Neĝeca Pirfloraro

Neĝeca pirfloraro nokton de intimo
 Similas al neĝflokaj pli ol kutimo.
 Brizo blovas kun mia sento afabla,
 Blovas brizo kun sento mia afabla.
 Neĝeca pirfloraro bontempe sen limo
 Similas al neĝflokaj pli ol kutimo.
 Papilioj flugas kun mia sento nova,
 Flugas papilioj kun sento mia nova.
 Amikon disan sopiras mi ĉe sunsubiro,
 Kaj tenere pensas tuttage kun aspiro.
 Se nur vi sanas, ĉiu tempo iĝas bela;
 Malgraŭ la foreco, mi restas fidela.
 Via nomo skribiĝis sur la verda folio,
 Kiu faras rendezuon kun vi per idilio.
 Venu kaj aprecu la neĝecan pirfloraron,
 Restu aprecante la neĝecan pirfloraron!

Amo je la Acerfolioj

Kirliĝantaj estas ruĝaj folioj,
 Ili ĝemante forlasas la sorton.
 Kirliĝantaj estas ruĝaj folioj,
 Adiaŭante amare teneran vorton.
 Amo similas al acerfolioj en aŭtuno,
 Ne plu brilas kun la antaŭa fervoro.
 Amo similas al acerfolioj en aŭtuno,
 Belas kurte tamen amare en mia koro.

La acerfolioj tuj forflugas kun sonĝoj,
 Rigardante reciproke ni ploras silente.

La folioj portas la tutan amon atente,
 Kaj pli malproksimen flosas kun sonĝoj.

La vespersuno akompanas vin for en ĉi
 momento,

Ĉu eblas la pasio en mia koro revivi kun
 flamo?

Per vespersuno forportiĝas de mia vivo la
 amo,

La flokojn de sonĝoj forprenas la aŭtuna
 vento.

La amkanto amara

Mi ĉagreniĝas pri la amo
 De la neforgeseblaj tagoj
 Plene de emociaj imagoj
 Kun larmeroj kaj flamo.

La vundita amo plenas de dezerteco;
 Kun pentado senlima mi amare ploras.
 Mi ne forgesas tiun, kiun mi adoras;
 La amkanto sonas kun daŭra mizereco.

La amkanto pri la amo vundita
 Ĉiam min kun larmeroj doloras.
 Mi sopiras vin, kiun mi amoras;
 La amkanto estas amare kantita.

Mi neniel forgesas de la amo perdita.
 Kie estas vi, kiun mi ĉiam memoras?

La floranta burĝono

La floranta burĝono
 Kun delikata bontono
 Baldaŭ koketos eĉ pli
 Kiam en floro plena.
 Nur en mia bieno ĝardena
 Oni trovas vin kun idili'.

La knabinoj enias al vi,
 Ĉar vi belas prominente.

Nun al vi enamiĝis mi,
Ili ne ĝojas evidente.

Venu, venu tuj, mia kara!
Venu tuj, mia rozo rara!

Elĉinigis



**Yi Qiao (ĉino en
Germanio)**

Qin Feng

Klaro kaj Brilo: Du larmgutoj de aprilo

Klaro kaj Brilo. du ĉinaj ideografiaĵoj
nuraj vivantaj en dezerta aprilo,
du larmgutoj, solecaj kaj afliktitaj,
jam estas frotitaj kaj lavitaj
de pluvo el fremda loko.
ĉe enirejo de la vilaĝo, malfermu
la pordegon de vivo kaj morto en hejmloko,
vastas la ĉielo kaj la tero, kiuj detruigis kiel
polvo,
velkintaj herboj, aspiratoj de sekiĝinta arbo
kaj vento
Sur vojo hejmvirena neniu revenas,
Sufero, fojfoje adoptita de la tero,
ĝi kreskas kiel unika planto:
Tombo de patrino, tombo de patro.
Mi, kiel fatalo de la prauloj,
Mi estas propra orfo,
Tomboŝtono, kiu moviĝas starante.

Elĉinigis



Ardo (Ĉinio)



Mimoza Ahmeti



La kanzono de la ruĝa diablo

Kiom peza estas ĉi tiu momento, abomeninda
Preni la krajonon, alproksimiĝi al la
paperfolio.
Sed ne lasas min la diablo, la diablo moviĝas.
vagu diablo, vagu!
Vagu tra la hodiaŭo, tra la hieraŭo, tra la
morgaŭo.
Vagu kun mi, ĉe mi, por mi.
Vagu kun aliaj, sur aliaj, sub la aliaj.
Vi ne estas hundino, nek sorĉistino, nek
ĉiesulino,
Mia perfekteco estas, ho diablo!

Ho diablo- mia spirito.

Ho diablo- mia rabio.

Ho diablo- mia identeco.

Je karno kaj je animo.

Gapanta diabla okulo vidanta ene de la
konscio

Tion kion la vizaĝa okulo paligas, svenigas.

Diabla tuŝanta mano,

La malpermesintajn pomojn forkaptas kaj
gustumas

Diablaj piedoj: paŝas tutplezure sur la kruta
abismo.

Diablaj lipoj kisantaj la anĝelajn lipojn,

Kiujn ankaŭ la dioj ne rajtas ŝati.

Diablaj paroloj: ili ne havas eĉ sonojn,

Sed diratas, silente diratas kaj frapas precize.

Venko, ho mia diabla spirito,

Ho mia spirita diablo!

Aldiris la diablo al diabla sino-

Elpagu, mortigu, antaŭenpaŝu!

Estas nigraj murdoj, sed ankaŭ ruĝaj.

Vi estas ruĝa, mia diablo, ruĝa.
 Vi estas la instigilo de la ruĝa mondo,
 Ĉar estas ankaŭ nigra mondo, ankaŭ nigra
 instigilo,
 Ankaŭ la nigra diablo.

Vi nun estas:
 Flirtulo, ribelulo sen obstakloj,
 Malatentulo ĝis certeco.
 Estu bonfortuna, ho sortokreanto!
 Mia lasta restaĵo en ĉi tiu vivo.

Bruligo, bruligo, bruligo de la mensogo,
 Vagado de la feliĉaj flamoj de vereco.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi
 (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Chen Yuyi (1090-1139)

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Por pasigi l' Drakboatan Feston*,
 ĉantas Chu-poemojn** ni laŭtsone.
 Por mi, gast' vaganta de-loko-al-loke
 temp' forpasas fulme laŭsezono.
 Granatflor' ne tiom ruĝas kiom
 floroj sur dancista jup' surfone.
 Ja neniŭ konas miajn splenojn
 kaj ĉagrenojn laŭrezono.
 Kantas mi ja iritite kaj kantvoĉo
 eĉ kurtenojn vente levas nepardone.

Plenŝarĝita per oficaferoj,
 pro grandaĝ' mi frakasiĝas plene.
 Tamen mi al l' oriento
 ĉiam turnas min ridetmiene.
 Mi ĉijare drinkas per lastjara
 same granda tas' senĝene.
 Nun mi verŝas vinon en akvfluron
 sub la pont' ĉagrene.

Ĉi-vespere ĝi rapide fluu
 al rivero Xiangjiang ja alvene.

* *La Drak-boata Festo okazas ĉiujare je la 5-a de la 5-a monato laŭ la ĉina lunkalendaro, dum kiu oni memorfestas la patriotan poeton Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.), kiu sin ĵetis en riveron pro humiligo kaj forpuŝo de perfidemaj korteganoj.*

** *Chu-poemoj estas ĝenro de poezio kreita de Qu Yuan.*

Zhang Yuangan (1091-1170)

—laŭ melodio *Rivero plenruĝa*

Nebulo vualas printempan akvfluron
 leviĝas ondar' jen kaj jen sub ventpelo.
 Griznuboj subite amase plenkovras
 la montojn en for' per malhelo,
 kaj l' nokta vent' intensiĝas
 pli kaj pli minace jen sub la ĉielo.
 El verda sabl-benka aromo alŝvebas,
 la vel' malhisiĝas meze de l' rivero.
 La ŝip' hejmenira ankriĝas ĉe bordo,
 min kaptas ĉagreno de pluva kruelo.

Kun frido printempa ankoraŭ restanta
 mi dormas sub minca vatit-litkovrilo.
 Mia nostalgio turmentas min vere,
 korŝira ĉagreno min mordas jen kun
 maltrankvilo.

Sendorma mi ĉe ŝipfenestro rigardas
 al la riverfluo malluma sen brilo.
 Mi vole nevole la tason de vino
 ja levas por sola drinki sen konsilo.
 Jam la difinita tempdaŭro forpasis,
 mi rompis promeson laŭ ŝia deziro.
 Plejeble ŝi ĉe la fenestr' de la domo
 atendas revenon de l' ŝip' kun sopiro,
 la loza vestaĵo pakvolvas figuron
 ostecan kaj sveltan en ŝia gracilo.

—laŭ melodio *Gratulo al novedzo*

Mi ascendas altan turon
 kun la irbaston' en mano.
 Grand-Ĉerpilo pendas base,
 ondas akvo kiel oceano.
 La lunlum' vualas sablobenkon

en malklar' de diafano.
 Post forpelo de flosantaj nuboj
 vent' ankoraŭ blovas kun elano.
 Mi ankoraŭ ne veturi volas
 trans river' per pramo.
 En profundon de fragmitoj
 grupoj jam descendis por dorm-bano.
 En despero mi rigardas al la tero vasta,
 tamen homoj dormas ja kun ronkcunamo.
 Kiu povus danci kune kun mi
 ebrie en kompano?

La klopodo dekjara por repreni
 la perditan teron vaporiĝas vere
 kiel fantazia songo.
 Sur la alta tur' malvarma vent' severe
 min vipfrapas. En la kor' mi kovas
 haton kontraŭ l' hunoj netolere,
 kaj perforte glavmortigos ilin ĉiujn.
 Sed malnova la palavro malfidele
 igas la armilojn polvkoritaj kaj rustiĝi.
 Generaloj, jen komentu, justamaniere,
 ĉu ni povus hokofiši jen ermite
 ĉe l' river' sen emocio surd-orele?
 Forta vento furioze blovas,
 jen mi volas rajdi sur ĝi senŝancele!

—**laŭ melodio *Gratulo al novedzo***

Eĉ en songo mi pri la perdita tero
 de la nordo pensas ja sopire.
 L' aŭtunvent' alportas kornajn sonojn
 el la garnizono ĉagrenigas min korŝire.
 Jam herbaĉoj plenas en palac' malnova,
 kun etos' dezerta trist-inspire.
 Kial akv' el Kunlun-mont' invadas,
 inundigas Flav-riveron ĉien tre facile?
 Mil kaj mil vilaĝoj ruiniĝis, ke leporoj,
 vulpoj hantas tie ir-reire.
 Providenc' nekompreneblas al la homoj,
 kaj la homa splen' direblas malfacile.
 Mi kun retenita ĝen' forsendas
 vin al la foro ja suspire.

Frida vent' karesas salikarbojn
 kaj balais varmon jen ĝis nulo.

Lakta vojo superbrilas lunon,
 blankaj nuboj flosas en leĝera lulo.
 Kie vi vin trovas, mi volas scii,
 sur la vasta tero sen mezuro?
 Mi ne emas rememori en ĉagreno
 pri la nokta babilad' kun vi en plezuro.
 Nun vi jam troviĝos en tre fora loko,
 kiun ne leterkolomb' atingus per veturo.
 Kion fari por komunikado nia?
 Ni du kovas ambicion sen kalkulo
 pri malgravaj bagateloj pri meritoj.
 Ni pokalon levu jen por tosti
 je vojaĝa via en sekuro.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Li Gou (1009 - 1059)

Sopiro al la hejmlaka

Al la rando de la tero, kie l' suno falas,
 forte mi rigardas, kaj ĉe mi hejmve' amaras.
 Min ĉagrenas, ke krepuskaj nuboj nun vualas
 verdajn montojn kiuj vojon al la hejmo baras.

Sima Guang (1019 – 1086)

La frua somero en mia vojaĝo

En kvara lunmonato postpluva tago klaras,
 La suda monto kontraŭ l' gastejo hele staras.
 Ne flirtas la salikaj florkvastoj en aero;
 Sunfloroj nur al suno kapklinon sian faras.

Wang Anshi (1021 - 1086)

Printempa nokto

Klepsidro malpleniĝas, incenso tute ĉesas
 bruladi, dume vento la frida min agresas.
 Maldormas mi pro l' tento printempa, en
 lunlumo

flor-ombroj balustradon moveme nun karesas.

La vojara tago

En petard-krakaj sonoj forsvenas pasint-jaro,
En temp' printempa homoj drinkadas sen
avaro.

Mil kaj mil familiojn varmigas brila suno,
Fetiĉon novan gluas oni al pordklap-paro.

Bei-monto

Bei-monto portas verdon al l' akvoj kiuj tajdas,
En lagoj kaj riveroj smeraldaj ondoj saltas.
Mi sidas tiel longe por florojn zorge nombri;
Por serĉi belajn herbojn mi rehejmiĝi tardas.

Umeffloroj

Umeoj kelkaj kreskas ĉe-angule,
spite al frosto, solaj en florado.
La floroj ja ne estas neĝ' nature,
ĉar la aromo alŝvebas senspure.

Elĉinigi



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-OKA

La reĝoj, kiuj abdikas la tronon

§28-04

La regno Han kaj la regno Wei disputis pri posedo de peco da teritorio ĉe sia landlimo. Iun tagon la majstro Huazi iris viziti la markizon de la regno de Wei, kiu aspektis tre maltrankvile. Huazi diris:

“Supozu, ke nun ni petas la tutan popolon en la mondo prezenti al vi skribitan konsenton, kiu tekstas:

‘Tiu, kiu prenas tiun ĉi skribon per sia maldekstra mano, suferos fortranĉon de la dekstra mano; tiu, kiu prenas tiun ĉi skribon per sia dekstra mano, suferos fortranĉon de la maldekstra mano. Sed tiu, kiu prenas la skribon, fariĝos la reganto super la mondo.’ Ĉu vi volos preni la skribon sub ĉi tiuj kondiĉoj?”

“Neniel,” diris la markizo.

“Nu tre bone,” diris la majstro Huazi. “El tio, kion vi diras, ni povas konkludi: viaj brakoj estas pli gravaj, ol la mondo, kaj via vivo estas pli grava, ol viaj brakoj. La regno Han estas malpli grava ol la mondo; simile, la peco da teritorio en disputado estas multe malpli grava ol la regno Han. Kial do vi devas lasi la maltrankvilon ronĝi vian sanon pro la timo, ke vi ne povos akiri la pridisputatan pecon da tero?”

“Bone dirite!” diris la markizo. “Multaj homoj parolis al mi pri tio, sed neniu donis al mi tiel saĝan konsilon.”

Oni povas diri, ke la majstro Huazi vere scias, kio estas akcesora kaj kio esenca.

§28-05

Aŭdinte, ke Yan He estas homo jam atinginta la Taŭon, la duko de la regno Lu sendis al li senditon kun silkaĵoj kiel esprimon de admiro kaj respekto. Yan He vivis en mallarĝa strateto, portis krudan veston kaj mem nutris siajn bovojn. Kiam la sendito venis al la domo de Yan He, tiu eliris por lin persone renkonti.

“Ĉu tiu ĉi estas la hejmo de Yan He?” demandis la sendito.

“Jes, ĝi estas,” respondis Yan He.

Kiam la sendito prezentis la monon kaj la silkaĵojn, Yan He diris al li:

“Mi timas, ke eble vi ne ricevis la ĝustan mesaĝon. Vi preferu konfirmi ĝin, por ke vi evitu punon pro eraro.”

La sendito revenis post kiam li faris sin certa pri sia misio, sed ĉi-foje Yan He jam estis netrovebla. Tia homo, kiel Yan He, estis ekzemplo de vera malestimo al la riĉaĵoj kaj honoroj.

Tial la esenco de la Taŭo povas esti uzata por konservi la sanon; la neĉefa parto de la Taŭo, por regi la regnon; la rekremento de la Taŭo, por regi la mondon. El tio sekvas, ke la atingoj de la imperiestroj kaj la reĝoj estas nenio pli ol libertempaj aktivecoj por la

saĝulo. Ili neniel povas helpi al konservado de la sano kaj kulturado de la menso. Ĉu ne estas lamentinde, ke la nunaj vulgaraj nobluloj ignoras sian naturan dispozicion kaj oferas sian vivon pro la ĉasado de la materialaj posedaĵoj?

Antaŭ ol fari ion ajn, la saĝulo ĉiam zorge ekzamenas la celon kaj la kialon. Se iu pafas al alte fluganta pasero altvaloran perlon kiel ŝtoneton, li certe estos mokata. Kial? Ĉar li pagas tiel altan prezon pro bagatela akiro. Ĉu la vivo ne estas pli valora ol la perlo?

§28-06

Vivante en malriĉeco, la majstro Liezi havis aspekton de malsato sur la vizaĝo. Iu vizitanto parolis pri li al Ziyang, ministro de la regno Zheng, dirante:

“Liezi estas virta klerulo, kiu jam atingis la Taŭon, sed li mizere vivas en la de vi regata lando. Ĉu vi estas homo, kiu malŝatas klerulojn kapablajn kaj virtajn?”

Pikite de tiuj ĉi vortoj, Ziyang tuj ordonis al la lokaj regnoficistoj sendi kvanton da greno al Liezi. Kiam la oficistoj sin prezentis antaŭ Liezi, tiu ĉi ĝentile rifuzis la donacon kun dankoj.

Post kiam la oficistoj foriris, Liezi eniris en la domon kaj trovis sian edzinon malgaje plendanta: “Mi aŭdis, ke la edzino kaj la infanoj de saĝulo, kiu atingis la Taŭon, povas vivi en komforteco kaj feliĉo, sed ni nun suferas malsaton. La ministro Ziyang donacis al vi la grenon nur pro sia respekto al vi, sed vi rifuzis akcepti ĝin. Ĉu mi estas destinita nur por suferi la mizeron?”

Liezi ekridetis kaj klarigis al sia edzino:

“La ministro Ziyang mem ne vere komprenas min. Li ordonis siajn homojn sendi al mi grenon nur pro tio, ke iu diris al li bonajn vortojn favore al mi kaj li ilin sekvis. Li ankaŭ povos ĵeti krimojn sur min kaj min punos tiam, kiam li aŭdos, kion aliaj diros al li malfavore. Jen kial mi rifuzis lian donacon.”

Poste, la popolo en la regno Zheng efektive ribelis kaj mortigis la ministron Ziyang.

§28-07

Kiam la reĝo Zhao de la regno Chu perdis sian tronon, iu ŝafbuĉisto nomata Yue akompanis lin dum

ties forkuro. Kiam la reĝo Zhao reakiris al si la regadon de la regno, li decidis rekompenci tiujn, kiuj lin sekvis dum la forkuro. La vico venis al la ŝafbuĉisto, sed tiu ĉi rifuzis akcepti la rekompencan, dirante:

“Kiam lia majesto perdis la regnon, ankaŭ mi perdis mian okupon; kiam lia majesto reakiris sian regnon, ankaŭ mi povis rekomenci mian ŝafbuĉadon, kaj per tio mi reakiris mian titolon kaj mian salajron. Kial do necesus doni al mi plian rekompencan?”

La reĝo donis insistan ordonon: “Li devas akcepti la rekompencan!”

La ŝafbuĉisto sin defendis, dirante: “La reĝo perdis sian regadon, kio ne estis mia kulpo, sekve mi ne devis submeti min al puno; nun la reĝo reakiris sian regadon, kio ne estas mia merito, tial mi ne kuraĝas akcepti lian rekompencan.”

La reĝo do ordonis: “Konduku la ŝafbuĉiston al mi!”

La ŝafbuĉisto diris: “Laŭ la leĝoj de la regno Chu nur tiu, kiu havas grandajn meritojn, povas honore ricevi aŭdiencon de lia majesto. Nu, mi havis nek sufiĉan inteligentecon por gardi la regnon, nek sufiĉan kuraĝon por mortigi la malamikojn. Mi forkuris en teruro, ĉar tiam, kiam la invadinta armeo de la regno Wu atakis Ying, nian ĉefurbon, mi estis timigita de la minacanta danĝero, kaj mi hazarde sekvis lian majeston dum la fuĝo. Nun lia majesto volas, kontraŭ la leĝoj kaj konvencioj, doni al mi aŭdiencon! Tio certe ne estas la okazaĵo, pri kiu mi volas, ke la mondo aŭdu.”

La reĝo diris tion al sia ministro Sima Ziqi:

“La ŝafbuĉisto Yue esprimis profundan ideon malgraŭ sia malalta pozicio. Mi volus, ke vi, en mia nomo, faru lin unu el miaj ministroj.”

Sima Ziqi transdiris la diron de la reĝo al la ŝafbuĉisto, kaj tiu ĉi diris:

“Mi kompreneble scias, ke la pozicio de ministro estas multe pli nobla, ol tiu de buĉisto. Mi scias ankaŭ, ke ministro enspezas multe pli, ol buĉisto. Sed mi ne povas permesi al mia avideco je pli alta pozicio kaj je pli da enspezo alporti al lia majesto fifamon pri malobservo de la leĝo. Mi ne kuraĝas akcepti lian proponon kaj mi preferas resti en mia buĉejo.”

Kaj tiele la ŝafbuĉisto Yue persistis en sia

